


MAJO
OKTOBRO
1977

106-7-8
(3-4-5)

PLI
BONE
MALFRŬE
OL
NENIAM





ENHAVO

ĈI-TIU REVUO	3
LA ORGANOJ DE TEJO EN POITIERS	4
HEJS, ION PLI OL REVUO	5
LINGVAJ NOTOJ	6
ATOMA ENERGIO KAJ HOMARO	7
FINFINE!	10
JOHANO	12
HISTORIO DE HISPANIO	13
LABORAJ FLANKOJ DE LA KONGRESO EN POITIERS	14
BRETONIO-BREIZH	17
HEJS EN LA 37a HISPANA KONGRESO DE E-O ...	21
AMUZE KONGRESI AŬ KONGRESI AMUZE	25
EL LA ARKIVO	27
LA SKOLTA MONDO	31
KAMPANJO "LLIBERTAT D'EXPRESSION"	31
ESPERANTO, ĈU VIVANTA LINGVO?	32
34a IJK DE TEJO EN VELIKO TIRNOVO	33
LA PLEJ BELA LOĜANTARO	36
50a KONGRESO DE SAT	39
KORESPONDOPETOJ	43

HEJS - Majo-Oktobro 1977

N-roj 106, 107, 108 (3, 4, 5)

© HEJS 1977

INTERNA BULTENO ORGANO DE HEJS

(HISPANA ESPERANTISTA JUNULARA SOCIETO)

Junulara sekcio de HEF - Landa Sekcio de TEJO

Gral. Mola, 99, 1r - Apartat 407

SABADELL (Barcelona) - Hispanio

Konto n-ro 15049-56 en Banc de Sabadell

Prezidanto: Ludoviko de Yzaguirre

Ĉefredaktoro: Oskar Puig i Cánovas

Presita en "L'Eina" - Dip. Legal. B.6519-1977

PRI LA SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ, RESPONDECAS

NUR LA AŬTORO. KAJ PRI ĈIO ALIA, RESPONDECAS

LA ESTRARO KAJ REDAKCIO DE HEJS.

ĈI-TIU REVUO

Karaj legantoj,

Kompreneble, ni devas diri ion pri tiu-ĉi revuo, ĉar ĝi enhavas la materialon de tri bultenoj ne aperintaj ĝustatempe.

Kialoj estas multnombraj, krom teknikaj malfacilaĵoj, inter kiuj, perdo de originaloj, preseja malfruiĝo, ktp., ekzistis kaj ekzistas ankoraŭ grava problemo de kunlaboro, nun la revuo devas esti redaktata nur kun nia propra materialo, niaj membroj tute ne kunlaboras, tio grandigas la jam pezan laboron de la redakcio.

Esperable, tiuj monatoj senbultenaj utilos por konsciigi la membraron, ke nek nia revuo, nek nia Societo funkcias dank' al aero aŭ al nekona-ta grupeto da bonvolaj personoj. Ne, nia Societo nur funkcios bone kiam ĉiuj membroj laboros laŭ siaj ebloj, dume ĝi nur lamos kaj je okazo de mal-facilaĝo ĝi riskas pereii.

La vivo de HEJS estas, do, en viaj manoj, ne en la niaj, ni nur gvidas, kunordigas, sed por tion fari bezonatas iujn por gvidi, ion por kunordi-gi. Tion ni bezonas kaj tion vi povas doni al ni.

Kunlaboru kaj ni estos la transmisiilo de viaj deziroj kiujn speguliĝos en nia laboro kaj en nia revuo.

Finfine, kaj spite al ĉio antaŭdirita, mi volas peti de vi pardonon pro tiu malfruiĝo de la re-vuo, esperante ke kun via helpo ĝi ne plu okazos.

Antaŭdankojn al ĉiuj,

Òscar Puig i Cánovas
Ĉefredaktoro

LA ORGANOJ DE TEJO EN POITIERS

La kongreso de TEJO havas ankaŭ la celon, ebligi ke ĝiaj organoj kunvenu plene unu fojon en la jaro almenaŭ, precipe ĝia komitato, kiu estas konsistigita de la estraro, la reprezentantoj de la LSj (Landaj sekcioj) kaj unuopaj komitatanoj.

Dum la kunsido de la komitato, kiu daŭras dum la tuta kongreso, estas likvidita la agado de la antaŭa jaro, per informado, kaj fiksita la laboro por la sekvanta periodo. Tio okazis ankaŭ ĉi-jare.

Unue, la estraro prezentis diversajn raportojn pri la pluraj agadokampoj dum la lasta jaro. Due, kiel ĉiu jaro, oni elektis novan estraron. Sed la estraro elektita ne estis egala al tiu de ĉiu jaro: ĝin partoprenas hispana, Hejs-ano. Kaj tio estas, ĉar la estraro de Hejs, laŭ unuanima decido, proponis kaj arde defendis antaŭ la Kandidatiga Komisiono s-anon Miguel Gutierrez Aduriz, eks-redaktoro de Hejs-bulteno; eks-vicprezidento de Hejs kaj unu el niaj plej aktivaj membroj. Li akceptis, kiel ankaŭ la Kandidatiga Komisiono kaj la Komitato. Tial, do, hispano nun estraras ĉe TEJO sub la prezidado de s-ano Savas Citurides kaj vicprezidado de s-anoj Ĝuljio Kapa kaj Stefano Makgil.

Aliaj gravaj kunsid-eroj estis: la akceptoj de du novaj LSj de TEJO: Finnlanda kaj Kanada; la ŝanĝo de la Statuto de TEJO kaj ties regularoj, por adapti ilin pli taŭge al nunaj cirkonstancoj.

Ankaŭ la estraro havis siajn apartajn kunvenojn, ne nur la komitato laboris. Kaj plejmulte laboris la Landa Kongresa Komitato, al kiu ŝuldiĝas la bonega sukceso de la kongreso.

Kiel lasta noto mi rakontu anekdoton, kaj tiu estas, ke ĉe LKK estis kelketaĵoj junuloj, inter kiuj modis uzado de praverka altliteratureska pronomo "ci", kiu iam en kelkaj skribaĵoj estis uzita anstataŭ "vi" kiam temis pri unu sola persono. Por ke vi imagu tion pli konkrete, tio estas same kiel kastililingvaj junuloj, kiuj alparolus sin uzante la donkiŝotan esprimformulon "vuesa.merced".

Kaj nur aldoni, ke Bulgario atendas nin.

Ludoviko de Yzaquirre i Maura.



NI ELDONIS LA ĈI-REPRODUKTITAN ALGLUAĴON VERDKOLORAN, CELE AL MONKUNLABORO KAJ REKLAMO POR NIA SOCIETO.

POR ILIN DISVENDI NI BEZONAS VIAN HELPON.

MENDU ILIN AL NIA SEKRETARIEJO.

PREZO: 25,- PTOJN, PLUS SENDOKOSTOJ.

MENDANTE 10 EKZEMPLEROJ, VI NE PAGOS SENDOKOSTOJN.

BONVOLU PAGI PER POŝTA ĜIRO JE VIA MENDO.

HEJS: IOM PLI OL REVUO

Jus en la fino de la IIIa HEJS-Tendaro kiam ankoraŭ ne estis for Madrido mi jam ekpensis pri la sukcesoj kaj rezultoj de tiu tendaro, precipe mi pensis pri la kunsido, do laŭ mia opinio, estis sufiĉe interesa kaj sufiĉe grava por ke ni konsideru ĝin, kiel principo de kelkaj ĉefaj taskoj fareblaj de HEJS.

Se mi bone memoras en la kunveno sub la suno, oni pritaktis-inter aliaj aferoj-ke HEJS devas esti iom pli ol bulteno, kaj nun tio devas esti la precipa tasko de ĉiu responda HEJS-ano. Se oni komprenas kaj konsciigas ke ni havas la estontecon de Esperanto, kompreneble en Hispanio, la afero estas sufiĉe grava. Ni estas nur la principo de io kio povas esti diversaj landaj organizoj, tio estas, unu Junulara Esperanto Federacio po ĉiu lando de nia Stato. Tamen mi kredas ke - nun tio estas nur sonĝo. Sed almenaŭ ni devas labori kaj kunlabori kunĉiuj nunaj landaj grupoj, eĉ mi opinias ke ĉiu HEJS-ano estas de vigata partopreni en tiu tasko.

Unu el la pozitivaj sukcesoj en la Tendaro, estis la akordo pri la enketo. Ĝi estas serioza tasko kiu certe alportos interesan dokumentaron pri la lingva problemo en nia ŝtato, ĉar nun mi kredas ke oni malmulte konas pri opinioj kaj pensomaniere de famaj kaj gravaj personoj koncerne al tiu problemo kiu estas rekte ligita al Esperanta-ideo. Tiu enketo ankaŭ povas esti interesa, ĉar eble kelkaj enketataj personoj povas resulti elektitaj en la estonta kamero, kaj kiaj opinioj pri lingva problemo pri Esperanto kaj aliaj estos tien. Nun mi - ne plu parolos pri lingva problemo, ĉar tio povas esti temo por alia artikolo, do estas sufiĉe longa kaj malsimpla. Nur unu ekzemplo: La - estontaj deputitoj el diversaj landoj de nia ŝtato en oficialaj kunvenoj kiumlingvon devos paroli? Ĉu ili povos paroli siangepatranlingvon, ĉu ili devos esprimi kastilian nur, malgraŭ ili estus el Galegujo, el Vaskujo, k.t.p.?

Antaŭ mi parolis pri landaj organizoj en Hispana Stato. Tio ne estas tiel revolucia ideo. Kiel ŝajnas principe, do, se oni pensas iometepri tio, oni konstatas ke ĉiu lando estas malsama al alia, ĉiu lando havas propran lingvon, kulturon, propran kutimon, kaj folkloron, ankaŭ estas tute malsama, kompreneble pro tio ĉio, mi kredas ke neniu lando-grupo devas esti ligata aŭ dependa de alia, sed devas esti tute aŭtonoma kaj rilatata al alia per frateca kunlaborado, kia maniere oni povas atingi tion? Principe oni devas komenci taskon por ke ĉiu - lando-grupo estos sufiĉe forta, kaj havu propran vivon kaj komence propran bultenon.

Nun mi volas lasi tiu temo ĉar ĝi estas iomete "verda". Tamen mi atendas opiniojn, ideojn kaj kritikaĵojn pri la afero.

Artur

LINGVAJ NOTOJ

Pri la komoj La plejmulto el la hispanoj, kiam ĝi skribas en unu el niaj naciaj lingvoj, ne bone uzas la komon. Sed kiam hispano skribas en Esperanto, la afero fariĝas ankoraŭ pli grava. Tial, tiu ĉi noto celas iomete klarigi la uzadon de la komo. Kaj tio estas sciigante, ke oni - skribu komon ĉiam, kiam komenciĝas subordigita frazo. Tiu ĉi simpla konsilo estas ege efika: se ni analizas nian presaĵaron, ni konstato, ke pli ol la duono el la komoj-eraroj aŭ komo-eraroj okazas pro tio, ke oni ne atentis pri la subordigitaj frazoj. Mi proponas al vi ekzercen, por ke vi komencu praktiki: kaj ĝi estas tio, ke vi trovu en ĉi-paragrafo - almenaŭ 5 subordigitajn frazojn, antaŭ kiuj tr viĝas komo.

Por eltrovemuĵoj Mi proponas al ili ludon, kiu povas fariĝi serioza vorto-fonto. Tio estas kapti vorton, kies radiko ŝajnas konsistigita el aliaj radikoj, kaj "disigi" ĝin kvaze ŝi estus plur-era. Mi prezentas tri tiajn vortojn: publicisto, faŝismo kaj neglekti.


Publicisto estas "tiu, kiu profesie skribas en gazeto aŭ revuo pri aktualej demandoj". Ĝia radiko estas PUBLICIST-, sed, se ni deprenas el ĝi la sufikson -IST-, restas nova radiko PUBLIC-, el kiu ni povas tiri la verbon publici: skribi en gazeto aŭ revuo pri aktualej demandoj" kaj aliajn vortojn kiel publicinda, publicenda, publicebla, publiceska, mispublici, publicumo kaj kompreneble, publicisto.

Faŝismo estas "politika movado...karakterizita per kulto al la ŝtato diktatore regata". Ĝia radiko estas FAŜISM-, kaj, agante kiel ĉe publicisto, ni deprenas la sufikson -ISM-, kaj aperas nova radiko FAŜ-, el kiu ni povas fari la verbon faŝi, kies signifo povus esti pli-malpli - "favori diktatoran rego-manieron, aŭ mem tiel regi", kaj kun simila radiko-signifo: malfaŝi, faŝedo, faŝeco, faŝema, kaj ankaŭ faŝismo kaj faŝisto.

Neglekti estas "lasi ne farita, ne atentata, ne zorgita". Ĝia radiko estas NEGLEKT-, el kiu ni povas, laŭ nia jam konata tekniko, forigi NE-, kaj restas GLEKT. Estas facile supozi, ke la signifo de glekti estu "lasi farita", atentata, zorgita". Aliaj idoj el tiu-ĉi radiko povas esti: glectado, glectebla, glectema, glectinda, glectilo, glectisto, -minglekti, neglekti, neglectado kaj neglectema.

Prononc-eraro oftas la homoj, kiuj prononcas erare la pronomojn de la serio tiu, ktp. Unua eraro estas ilin prononci tiel: tiŭ, kiŭ, neniŭ, ĉiŭ, iŭ anstataŭ ti-u, ki-u, ne-ni-u, ĉi-u, i-u; dua eraro estas prononci iliajn plur-nombrojn tiel: tiŭi, kiŭi, neniŭi, ĉiŭi, iŭi anstataŭ ti-uj, ki-uj, ne-ni-uj, ĉi-uj kaj i-uj. Malgraŭ la fakto, ke tiu - misprononco kutime ne malklarigas la signifon de la concernataj frazoj, ĝi montras ian neglectemon kaj nezorgemon de la cerolanto, kiu en normala uzo de la lingvo ne gravas sed, ekzemple, ĉe prelegoj kaj aliaj seriozaj aranĝoj devas esti nepreterlasata.

ATOMA ENERGIO



**kaj
homaro** →

Lando el la tria mondo apartenos baldaŭ al la nukleovlandaro. Brazilo aĉetos la teknologion de tuta atomfizika ciklo. Germanujo (kiel iam Francio, Britio, Sovet-Unio, Usono...) enspezos eksterordinaran monkvanton. Kiu pagos ĝin? La brazila popolo, superregata de militista polica ŝtato. Kaj fakte, la brazila popolo tute ne volas nukleajn centralojn. Nek en Brazilo, nek en Katalunujo, nek en Sorio, nek ie ajn estas ŝatataj nukleaj elektrofaraĵoj. Ĉu la firegistroj estas stultuloj? Ĉu la pravo apartenas unike al la povularo, de registaroj reprezentita?

Jus-farita enketo montras ke 70 % da germanoj pagus volonte por eviti radiaktivan malpurigadon. Sed laŭ oficialaj (aŭ preskaŭ oficialaj) revuoj el la tuta industriigita mondo, tiuj, kiuj kontraŭstaras nukleajn centralojn estas ne konsiderindaj, ne mirindaj sen pravuloj, kies voĉoj misdifinas la bonan, ŝtatanantan popolon. En Sovet-Unio ili eĉ riskas eniri malliberejon.

Ni ne pritraktu nun la aferon laŭ vidpunkto teknika. Ni montru nur, ke konstrui atomajn centralojn fundamentiĝas nur sur enspezo de politikistoj. Antaŭ tio, ni diru tamen, ke tiaj ejoj bezonas multegan akvon (por malvarmigado) kaj ke la bezonata fisigebla kru dajo devas esti rafinata antaŭ sia uzado en multekostaj kaj de mal multegaj landoj havataj fabrikoj.

Registaroj certigas ĉiam, ke nukleaj centraloj estas fundamentaj eroj en la energia sistemo. Tamen oni konstatas laŭstatistike ke nur parteto de ĝi venas el atomo. Britio kaj Usono estas la solaj landoj, kie elnuklea elektro estas konsiderinda. Malgraŭ la ĝenerala opinio, elektro el reaktoroj estas pli kosta ol tiu el aliaj devenoj. Kvankam la kilovattoro malpli kostas, tio ne kompenzas la egan elspezon dum la konstruado. Nukleaj centraloj mortigas agrikulturon por aktivigi industrion. En Aragono, ekzemple, la pli nukleigado bezonas (os) multajn diglagojn. Tiuj diglagoj inundas la kultureblan grundon kaj la agrikulturo iom post iom malaperas. El Aragono elmigradas vere tro da homoj. Ĉu la atoma energio ne sufiĉas por halti tiun elmigradon? En Francio oni pruvis ke la diglagoj bezonataj por la nukleocentraloj havas pereigan, ekologian influon. Pro ili, akvo perdas oksigenon kaj la temperatura diferenco inter du proksimaj punktoj en la rivero povas esti eĉ 10°C. (Ni rememoru ke la akvo uzata en centraloj revenas en la riveron pli varma ol ĝi eliris). Algoj, do abundas kaj malpermesas vivon, En riveraj ebenaĵoj la kulturo de melonoj tute malaperas.

Sed certe la plej grava problemo ĉi tie estas la media malpurigado per radioaktivaj restaĵoj kaj la akcidentrisko. Atomaj reaktoroj ne povas eksplodi kiel atoma bombo, tamen ilia danĝero estas memorinda kaj memorenda. Eĉ la aŭtoritatoj scias tion. Se tio ne verus, Kial konstrui nukleajn centralojn for de multe industriigitaj, multe loĝitaj regionoj? Estus saĝa propono, havi ilin meze de grandaj urboj!

Kvankam nedirata, en Britio jam okazis foje (1957) grava akcidento (Windscale), kiu feliĉe povis esti kontrolata. Toriata radioaktiva substanco egalvaloris proksimume al dekono de tiu el la Hiroŝima bombo. Sciencistoj en Danlando, ankoraŭ ne informitaj pri la akcidento, detektis ĝin!

Ankaŭ ĉe ni estas tiklegaj danĝeroj: la centralo de Vandellós liberigas ĉiutage du tunojn da radioaktiva argono en aeron, kaj du milionoj ok cent mil tunojn da varmigita akvo en maron (ĝi estas 6,52 C pli varma ol normale, kaj ĝi havas, ankaŭ proksimume, 500 kilogramojn da puriganta, mortiganta kloro).

Postrestaĵojn ni nur menciu. El normala funkciado restas materialo, kio estas tre danĝera por homoj kaj kio ne povas esti uzata nek uzota. Oni devas gardi tiun rubon en metalaj ujoj, kiujn oni lasas ene de gemsala monto aŭ sur marfundo. La risiko tamen ekzistas, kaj se iam unu el la multaj ujoj malfermiĝus, la elirantaj fluaĵoj povus mortigi kaj infekti grandan parton de nia planedo! La venontaj generacioj rajtas vivi en planedo, kie ne estu ĉiamgardenda rubaĵo!

Ĉi ĉio estas gravega, sed estas ankoraŭ afero, kiu decidigas nin agi kontraŭ nukleajn centralojn. Ni parolu nun pri ilia agado sur la homoj.

Inter la radioaktivaj postrestaĵoj estas kelkaj, kiuj ne estas danĝeraj direkte, sed tamen jes tra naturaj biologiaj vojoj. La plimulto de tiuj vojoj kondukas al la homo.

En rivero Kolumbio (Usono) oni eksperimentis cele al malkovro de tia kunamasigprocezo. Ni nomu la kunamasignivelo de radioaktiva fosforo-32 en la central-eliranta akvo, unu. En algoj la nivelo estas ne unu, sed 35. Tio signifas, ke la vivantaj ĉeloj kunamasigas la radioaktivan fosforon. Ni daŭrigu la vojon! En riveraj anasoj la nivelo atingas jam 7500, en iliaj ovoĵoj 200000, kaj en la ovoŝafo, 2 milionoj. Tio estas, el nedanĝera akvo fariĝis preskaŭ-bomba ovo. Kompreneble ekzistas aliaj biologiaj vojoj, kondukantaj al la homo, sed la afero samas. Ĉiuj vivantaj organismoj konservas (memmortige) radioaktivan. La kaŭzo estas ankoraŭ nekonata.

Kelkaj radioaktivaj substancoj (karbono-14) ebligas mutaciojn en la fundamenta ĉela strukturo, kiuj kialas misformaĵojn kaj abortadojn. En la ĉirkaŭaĵo de Chalevoix (Miŝigano, Usono, kie staras pova kaj antaŭlonge konstruita nuklea centralo) oni mezuris la oftecon de malsanoj rilate al la cetera miŝigana ŝtato. Genetikaj misformaĵoj estis 230 foje plej ofte tie, leŭkemio estis 400 foje plej ofta, kaj geinfana mortado 49 foje. Postaj studoj montras, ke tio ne estas malsano de la geuloj de Chalevoix, sed de ĉiuj, kies hejmo staras apud atoma reaktoro.

Resume ni diras, ke nukleaj centraloj estas malpurigantaj rubaĵoj, kiuj atakas la homan vivon kaj kies utileco estas dubenda. Plie, espereble post dek aŭ dekkvin jaroj ni jam havos novan atoman teknologion, fandan anstataŭ fisian. Ĝi permesos produkti multegan elektron el preskaŭ senkosta hidrogeno, pere de nedanĝeraj fabrikoj. Ĝi ankaŭ ne malpurigos nian ŝatatan Teron. Nuntempe, ni devas aktivigi la batalon kontraŭ la fisia energio, ne nur burokrato, sed ankaŭ pere de personaj helpoj al vilaĝoj kaj vilaĝetoj, kie la povo deziras plifortigi sin per konstruado de nuklea centralo. Ho, en mia kor' firme kredas ni, ke fine glore venkos ni...

Martí Ruiz i Altaba

FIN FINE!

des, finfine ni povis partopreni veran tendaron, organiza-
nizitan kaj fruktodonan tendaron. La Madridaj samide-
noj post la sperto akirita en la du antaŭaj tendaroj,
sciis ĉerpi la profiteblajn aĵojn kaj kunfandiĝi kun
siaj novaj ideoj, rezultante interesvekan kaj agra-
blan renkontiĝon partoprenita de tridekdeko de gejunu-
loj el tuta nia ŝtato.

Ni parolas pri la IIIa HEJS-Tendaro kiu okazis la kam-
padejo Usuna el Madrid dum la tagoj 7,8,9 kaj 10 de a-
prilo. Ĝi estis organizita de la madridaj HEJS-anoj de
la Madrida Liceo de Esperanto.

Ĉio komencis jaŭdo posttagmeze kiam ĉiuj tendaranoj
alvenadis kaj post la registriĝo en karavano rolanta
kiel akceptejon, kaj saluti la aliarbajn geamikojn, ni
ekmontis, helpitaj de la tieaj madridanoj, la tendojn.
Post vespermanĝi ni renkontiĝis en granda tendo, kie ni
lernis diversajn esperantistajn kantojn, kaj kelkaj ge-
legaj amikoj preparis por ni tipan alkoholaĵon nomata
"Queimada" (pr. kejmada), ili enmetis "orujo"-n sukera
oranĝon kaj citronojn en granda metala ujo, kaj poste
bruligis ĝin. Post kelka tempo ĝi ekbruligis kaj oni
devis trinki ĝin kiam ĝi estis tre varma. Evidente,
multaj el ni tre gajiĝis kaj kantis ĝis laciĝo. Kiam
la suno reaperis kaj preskaŭ jam troviĝis ĉe la mezo
de sia vojo, ni grupiĝis en rondo sur la herbo kaj pro-
fesie fama argentina kantisto kies artista nomo estas
"Johano" kantis por ni ĝis kiam ni estis devigataj tag-
manĝi pro malsatego. Post la kantado ni intervjuis lin
en ĉi tiu bulteno vi trovos la interesan historion de
lia vivo

Post plenumi niajn stomakojn ni denove grupiĝis por o-
kazigi la plej gravan eventon de la tendaro, t.e. la
kunvenon, ĝi rezultis pli fruktodona ol ni antaŭimadis.

Fininte la kunveno, okazis tre interesa ludo pri la Esperanto-movado. Kaj suno finis sian vojon.

Tutan sabaton ni utiligis por ekskursi al Toledo, kie ni tagmanĝis; kiu jam estis en tiu historia urbo jam konas la regantan etoson, kaj kiu ne estis, imagu for mikejon kaj vi vidos nur la duonon da personoj vizitantaj Toledon. Kiu vidos tion povus pensi ke oni disdonas monon, do ne, tute kontraŭe oni devas pagi eĉ por respiri. Ni komentis inter ni, kial por vidi historiajn havaĵojn apartenantaj al la tuta socio, ni devas pagi. Ni komprenas ke oni devas purigi, ripari, gardi, kaj tiel plu la monumentojn, sed ni suspektas ke la granda kvanto de enspezataj pesetoj estas terure pli granda ol tiu de elspezoj. Svisujo bone scias tion.

Kiam ni denove troviĝis en Madrido, ni vizitis kelkajn tipajn trinkejojn por vespermanĝi.

Dimanĉon matene alvenis la horo de la adiaĉoj, ĉar multaj el ni havis pli ol sescent kilometrojn por raveturi hejmen. Kaj tiel finiĝis la IIIa HEJS-Tendaro kiu certe estos mejloŝtono de tiaj eventoj, eĉ ni povus diri, ke ĝi estis la plej bela el ĉiuj iam-organizitaj tendaroj.

-Oscar Puig-



JOHANO

La duan tagon de la tendaro ni povis aŭdi la kantist
Johano, premiita ĉi jare en la Festivalo de la Paco e
Valladolid pro sia interpretado.


Li trafis ankaŭ la 1an kaj 2an premion en la Festival
de la Hispanamerikanaj ambasadoj en Madrido.

Li naskiĝis en Buenos Aires, kie li kantis en la kant
ensemble "Montoneros".

Li ekkonis Esperanto en Argentinio kaj decidis ŝanĝi
sian kastilian nomon Juan Julio al Johano, ĉar li opi
nias ke kiam oni demandas lin pri ĝia signifo, li po
vas profiti la okazon por paroli pri la Esperanta lin
gvo.

Liaj kantoj estas universalaj, li kantas la pacon, la
amon kaj la interkompreniĝon.

Li venis Hispanion antaŭ du jaroj kaj lia unika labor
estas la muziko. Li preferas verki ol kanti, Ni dezi
ras al li la plej bonan sukceson.



HISTORIO DE HISPANIO

La historiisto M' Tambo trovis en la dezertaj landoj nordaj, proksime de tie, kie ne plu ekzistas vivo kaj komencas morta planedo, restaĵojn de ĵurnalo skribita en antikva hispana lingvo, kaj, ĵus alveninte denove en la malĵunan Afrikon, malgraŭ la forta pluvo li iras montri la trovaĵon al sia kolego kaj amiko Hernando de la Torre.

"Ili alvenis en siaj grandaj veturiloj, preskaŭ, preskaŭ, senanonce; kiel amikoj. Komence ni ne tute fidis, sed iom post iom ni konsciis iliajn ŝajne bonajn intencojn. Ili alportis al ni novajn ideojn pri libero, respekto al la homaj rajtoj, ktp. Unue venis al ni malmultaj kaj ni trovis ilin strangaj. Vere ili estis samaj kiel ni, sed IAL ili alaspektis diferencaj, kaj la gento rimarkis ilin surstrate. Poste ni kutimiĝis; ili pasis preskaŭ nerimarkitaj kaj komencis miksiĝi kun ni, eniris en niajn trinkejojn, ĉeestis niajn spektaklojn, kisis niajn virinojn... sed, ĉion ĉi, kun siaj strangaj vestaĵoj; siaj specialaj kutimoj kaj la certeco esti supera raso, (ĉi certecon sentis ankaŭ multaj timuloj).


Estis kelkaj kiuj kontraŭstaris, sed la plimulto akceptis ilin; verdire, ilin ignoris; kaj dank'al tiu plimulto ilia nombro grande pliiĝis, la kvartaloj kie ili loĝis fariĝis pli kaj pli grandaj, senĉese ili plimiksiĝis kun ni, sed preskaŭ neniam starigis intimajn rilatojn; ili vivis kun ni sed en aparta socio...

Kiam ni ekkonsciis, ili havis ĉiujn la risortojn de la ŝtato en siaj manoj. Kelkaj grupoj avertis nin, sed ni ne konsideris ilin kaj nun estas jam malfrue. Ni devas agi kaŝe, ĉar, kontraŭe, ili povas arestigi nin; ni ne povas lukti kontraŭ ili, ili estas tro fortaj, scias ĉion kaj estas ĉie. Kompatinda Hispanio, kompatinda mondo..."

- Ĉu ĝi ŝajnas al vi interesa? Tio ĉi konfirmas mian teorion pri tio, ke antaŭ la GRANDA PEREO estis invado de estaĵoj de alia planedo, kiuj kaŭzis la katastrofon.

- Jes, la eltrovo de tiu ĵurnala peco estas grava por la klarigo de la komenco de la nova erao, ĉar preskaŭ ĉiuj libroj, pro la kutimo skribi ilin sur organika materio, detruigis. Sed, de kie venis tiuj estaĵoj?

- Mi ne scias, sed sur muro mi povis legi strangan frazon, kiu troviĝas plurfoje en la ĵurnalo: YANKEES GO HOME.



Aŭtoro: Daniel Sanchez Serrano
Elkastiliigo de: Liven Dek

LABORAJ FLANKOJ DE LA KONGRESO EN

POITIERS

Ĝenerale en la kongresoj krom amuzigi oni ankaŭ teorie celas iom labori. En Poitiers ne estis nur teorio sed tio fariĝis realo; kial? Ĉu pro la allogeco de la diversaj laborgrupoj? Ĉu pro laboremo de la ĉeestantaro? La afero estas ke la laborgrupoj estis vere plenaj kaj la partoprenontaj vigle diskutis la diversajn temojn.

La temo de la kongreso estis: "Perspektivoj por junulara movado" (ĝenerale, ne nur esperantista) Tiu temon pro ĝia tro amplekso oni disdividis laŭ la jenaj 8 laborgrupoj:

- Junularo kaj malarmando.
- La pozicio de junularaj esperantaj organizoj ene de la propa lando.
- Problemoj de junularaj trupoj: Traduko de teatraĵoj.
- Akvo-purigado.
- Esperanto kaj la rajtoj de la popoloj.
- Kiel aranĝi kernon por junulara movado.

Estis kelkaj grupoj, kiuj pritaktis temojn interesajn por junuloj ĝenerale (Junularo kaj malarmando, Akvo-purigado, ktp.) sed ankaŭ aliaj kiuj precipe pritaktis organizajn kaj varbajn aspektojn de specife esperantaj junularaj movadoj. Tiuj ĉi estis multe pli ĉeestataj ol la aliaj. Tio elmontras la kreskantan intereson de la junuloj, ke Esperanto ne nur restu en esperanta medio sed fariĝu ĉiutaga afero por la neesperantis taro.

Kontraste kun la aliaj laborgrupoj, estis ebleco por ĉiuj partopreni la grupon pri varbumo, kiu estis, do, la plej grava. Pri ties multnombra partopreno, oni disdividis ĝin en tri diskutgrupoj; krome, pro la diskutemo de la partoprenantoj, oni estis devigita daŭrigi la sesion.

En kelkaj temoj pro manko da tempo oni ne atingis difinitajn konkludojn, tamen estis bonega okazo por cerbumi kaj interŝanĝi ideojn kaj vidpunktojn internacie.

Ankaŭ estis grupo por la esperantiĝantoj en - kiu oni amuze lernigis Esperanton.

Multaj aktivaj kongresanoj kuraĝis partopreni multajn laborgrupojn malgraŭ la kabareta vespero kaj aliaj noktaj distraĵoj.

Je la konkluda forumo oni kolektis kaj diskonigis la rezultojn de la diversaj laborgrupoj fare de ties diversaj gvidantoj. Poste oni legis la Kongresan Revolucion ellaborintaj de la komitato, el kiu estas rimarkindaj, rilare al la laborgrupoj, la jenaj punktoj:

Rilate la grupoj pri malarmado kaj pri la rajtoj de la popoloj:

" La Kongreso:

-rekonante, ke la celoj de la UNESKO kaj UEA/TEJO estas grandparto komunaj, atentigas pri la neceso kunlabori kun ties organoj sur ĉiuj niveloj,

elirante el la fakto, ke la armado kaŭzas perdodon de naciaj riĉaĵoj kaj kontraŭas al malstreĉigo inter la popoloj,

kun kontento rimarkas, ke la malstreĉigo fariĝis la dominanta tendeco en la internaciaj rilatoj kaj,

atentigas pri la neceso paŝi antaŭen por la celoj difinitaj en la Fina Akto de Helsinki; salutas:

La Mondan Festivalon de Junularo kaj Studenta-

ro okazontan en Habana 1978,
La Kongreson de Internacia Lingvo pri la Rajtoj
de la Popoloj okazontan en Barcelona, decembro
1977 kaj

alvokas la atenton de la partoprenantaro al pri
Penso pri la rolo, kiun la lingva demando ludas
rilate la rajtojn de la popolojn, nome, ke la -
lingva kaj kultura subpremado estas ilo de impe-
riismo kaj ankaŭ, ke strebado al egalrajteco sur
la lingva kaj kultura kampoj estu komuna por ĉi-
uj, kiuj strebas al pli ju sta socio.

Rilate al grupo pri varbumo diras:
enkadre de la ĉeftemo intensive traktis la te-
mojn de varbado. La rezultoj estas prezentitaj
en la sumiga dokumento.

konstatas ke,

la varbado (en- kaj ekstermovado) en TEJO kaj -
en UEA estas pli bonigebla kaj plibonigenda.
indas daŭrigi la laboron komencitan, kiu aperas
en la dokumento por aktive realigi la ideojn le-
vitajn

indas kolekti kaj interŝanĝi materialon pri var-
bado inter la Landaj Asocioj kaj la Landaj Sek-
cioj de TEJO

komisias al la Komitato starigi konstantan komi-
sionon pri varbado, kiu plenumas la taskojn su-
prenomitajn. Tiu komisiono preferinde disponu -
pri oficejo kaj deĵoranto.

Tamen tio estas nur reflekto de la laboro farita,
kiu debas doni multajn pluajn fruktojn en la no-
vaj ideoj kaj projektoj de la partoprenantoj, -
naskigitaj aŭ klarigitaj de la kongreso.

JOHANO MORETÓ



BRETONIO BREIZH

Bretonio estas nacio en franca ŝtato kun 3312000 enloĝantoj sur 33700 kvkm. Malgraŭ tio, ke la orienta parto de la lando estas, jam de kelkaj jarcentoj, francaj rolanta (oriente de la linio de Sant-Brieg al Gwened), la bretona nacia unueco restas senmova.

La moderna bretona lingvo, kun kvar dialektoj, estas post 1941 ortografie unuigita. Proksimume unu miliono da homoj parolas bretone, kvankam multaj el ili normale ne uzas sian lingvon. La plimulto de la junularo ne parolivas bretone, sed ĝin ja ankoraŭ bone komprenas. Rememorinde estas, ke ĝis 1971 la instruado kaj la amasaj komunikiloj inde funkciis france. Nune la bretona estas permesita, sed tute malrekomendita.

Pro la subpremanta agado de la centralizanta franca ŝtato, Bretonio ne havas industrion. Tiamaniere, oni disponas pri malkosta laboristaro por la pariza regiono (estas normalaj la literaturaj referencoj al la bretona hejmservistino). La vivnivelo estas 2/3 de la franca mezvaloro. 1968e enkasis bretona laboristo 11900 frankojn, anstataŭ 19700 kiel la pariza. La elmigrado, kaperata de la instrua sistemo, daŭras: 20000 gejunuloj poĵare forlasas sian hejmlandon.

La batalado de bretonoj por sia nacia liberiĝo estas jam longa kaj okazintaĵoplena. Ĝia historio similas



tiun ĉe aliaj minoritatoj: post konservativa -reakcia-komenco, ĝi estas nune popola de-postulo, sed ankoraŭ malofte subtenata de la ceteraj francŝtataj laboristoj.

Mi deziras rimarki tamen, ke la bretona situacio sufiĉe multe malsimilas tiun de la batalantaj nacioj en la hispana ŝtato, kie la movadoj pliege fortas.

Ĉi kune aperas manifesto de bretonaj kantistoj, subskribita la finon de 1972, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas ofte menciita kiel depostula modelo, ne nur en Bretonio, sed en la tuta tera globo. Rimarkinda karaktero de la bretona luktanto estas sia dulingveco (bretona kaj franca), kiel oni tute ne rigardas kiel rezigno al nacia personeco (malsame al, ekz-e, Katalunaj Landoj). Ŝajnas al mi ke atenta legado de tiu ĉi manifesto ebligos bonan komprenon de la nunaj kantaraj movadoj kaj de Bretonio.

MANIFESTO DE BRETONAJ KANTISTOJ

Plessala, la 12an de Novembro
de 1973

De kelke da jaroj, la pliigo de luktoj aperigis novan kantan agadstilon. Tio okazigis la nunan kunvenon de bretonaj kantistoj, muzikistoj kaj poetoj.

Bretona kantisto devas solidareci kun la politika, ekonomia, socia kaj kultura liberiga batalo de la bretona popolo (ekzemple Batignolles, F.L.B.-a proceso, mitingo por la bretona lingvo...).

Tia pozicio rilate al nia nacia batalo sekvigas nian subtenadon al ĉiaj similaj luktoj en la mondo. Ni subtenas, do, la batalon de ĉiuj popoloj kaj minoritatoj kontraŭ la kapitalismo kaj la imperiismo, kontraŭ la politika kaj kultura subpremado (euskaroj, katalunoj, korsikanoj, irlandanoj, kurdoj, okcitanoj, vietnamanoj, ...)

Ni konstatas:

-sufokadon de la popola kreiveco pere de la uzado, kiun la burĝaro ekzercas, de la amaskomunikiloj (ĵurnaloj, televido, radio, sondiskaj firmaoj,...).

-sklavigon de la seksa emeco je la profito de la konsumado (industriaj "amaj" kanzonaĉoj, profitdonaj fidanĉejoj)

Ni rifuzas tiun bestecigadan entreprenon de la spektaklestroj regeske organizita.

Niaj paroloj ĉiam estis kaj estos je la servo de la popolo.

Subskribis:

Arbatz, Michel Basire, Ph. Bonnier, Yves le Brenn, Gilles Cardon, Gerard Delahaye, la grupo Diaouled Ar Menez, Gerard Ducos, Patrick Ewen, Ferrec, Xavier Grall Alain Gwell, Ewgen Kirhuel, Gweltaz Ar Fur, Youenn Gwer nig, la grupo La Jeune Garde, Serge Kerguiduff, Lamameur, René le Marer, Patrick le Mañson, Yvon le Meen, Myrddhin, Christel Noguez, la grupo Ar Pilhaouerien, Yvon Roussel, Rowing Gamblers, Gilles Servat, Tri Yann Ar Nanoed, Yann-Ber Ha Mikael, Glenmor, Paul Keineg.

malfermita listo

LUTTONS

POUR UNE

BRETAGNE LIBRE

NI LUKTU POR
LIBERA
BRETONIO



hejs

EN LA

37^a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



SABADELL
20-24 JULIO
1977

EL LA ARKIVO

RIBELO DE LA VORTOJ

Mi sonĝis pri tio, ke la vortoj ribelis kaj defiladis, kiel iam la nekontenta popolo de Romo al la Sankta-Monto. Antaŭe jam delonge malkvietiĝis la tuta vortaro. La vortoj susurante kaj sibladante plendis pri indignoj, tiom forte, ke mi preskaŭ vekigis. Ili koncentriĝis en furoran deklamforon kaj interrompis la silenton per similaj plendadoj:

— Senhonorigo! Oni suferigas nin de tago al tago pli kaj pli! Oni banaligas, miskomprenigas niajn originalajn signifojn. Konstante ni eluziĝas, ni fariĝas jam tute senvaloraj kaj se ni plu toleros tion, baldaŭ ni havos jam nenian sencon!

— Bone, ke oni mencias min, — kriis nun akre la vorto "senco". — La plej granda maljusteco okazas kun mi. Ĉiu senenca babilemulo elparolas min; oni konstante uzas min por la plej kanaj-laj celoj. KREDU min, sinjoroj, ke mi jam longe havas nenian sencon kaj ĉi fakto — estu lojala — estas fatala en mia fako.

— Li pravas! — muĝis responde la deklamforo. — Tion ankaŭ aliaj diras. Nia kolego, nomata "Spirito" ankaŭ plendas: oni tiel traktadis ĝin, ke ĝi jam ne plu sin sentas spirito, sed fantomo, kiun neniu kredas reala. La verbo "ami" minacas nin ploradante, ke ĝi mortigos sin, ĝi ne povas jam toleri la tre oftan trouzon. Oni uzas ĝin tiel hontinde por servi la plej suspektindajn interesojn, ke ĝia vortradiko sin naŭzas. Similaj indignoj turmentas niajn plej multajn verbojn: oni konjugacias ilin hontinde. Kaj tio la substantivojn koncernas, oni uzas ilin por portado de ŝarĝoj. Ili devas treni tiajn konceptojn, al kiuj ili havas nenian rilaton. La atributoj freneziĝas pro indignoj, ĉar ili perdis siajn kolorojn dum la malpura laboro kaj nun ili ĉiuj estas grizaj. Malbonaj verkistoj kaj nekleraj korespondantoj en la komerco kaj malnoblaj oratoroj tenas nin en brutala stato. Ni devas servi ĉion por ilia idiotismo kaj malico. Ĉu ni vivas por tio? Ĉu ni uzu por tio niajn plej belajn afiksojn? Ĉu ni

evoluis por tio dum jarmiloj el la ŝtonhakilaj felharkoroj interjekcioj al inteligentaj, kleraj, altgradaj esprimiloj?

— Kaj ĉu por tio oni devis nin abstraktigi? — stertoradis dolorplene la abstraktaj vortoj.

La ekscito de la ribelantaj vortoj kreskis de minuto al minuto. Entuziasmaj agitatoj kuradis de paĝo al paĝo: la konjunkcioj, kiujn trafis la plej multaj indignoj. La "kaj" pasie skuis siajn pugnojn kaj asertis per tute nekutima, drama vervo, ke neniam plu ĝi kunligos konceptojn, kiuj ne koncernas unu la alian.

— Ne plu mi estos partoprenanto de la mondotrompo! — ĝi kriegis kaj ĝia modesta kunulo, la muta streko kapjesis aprobante.

— Ankaŭ mi ĉesas labori! — ekkriis ekscitplene la "sed" — Depost nun mi esprimos la kontraston laŭ mia propra plaĉo. Kial mi devu, ekzemple, diri: "malriĉa, sed honesta", kial mi ne povu diri foje jam: "riĉa, sed honesta"?

Flanke de la ekscititaj konjunkcioj, la prepozicioj instigis plej intense la ribelon. Ili — bedaŭrinde — kapablis

nur ekekrii kaj tial ili malfacile plertudadis pri siaj indignoj. Ili havis dolorojn pleje pro tio, ke oni aplikis ilin erarmaniere. Ekzemple tiel: "al la popolo", dum la vereco estas "de la popolo". Ankaŭ la adverboj partoprenis la movadon kun forta decidemo. La giganta amaso de la vortoj ĉiam pli minace muĝis. Ĝi amaso ondadis, kirligis, sed ĝia movo akiris ĉiam pli da celkonscia ritmo, ĉiam pli da rekta direkto. Fine la ribelantaj vortoj ekiris je nehaltigebla marŝo al nekonata celo. La vortaro dum minutoj malpleniĝis: nur kelkaj apenaŭ uzataj monstroj restis surloke, kiel ekzemple la "reinfanĉambriĝo", "ekdekomencoĝisfinlegi" aŭ kelkaj altruditaj novaj vortoj, kiel "primavcro", "kindergarteno".

En la rondo de la homoj estis baldaŭ rimarkeblaj la sekvoj de la ribelo. La homoj senpove ŝanceliĝadis, gapadis kaj ili ne plu estis kapablaj regule mensogadi, klaĉadi, trompi kaj verki popularajn librojn. Pli poste ili apenaŭ povis eĉ rabi kaj murdi, ĉar en nia evoluiĝinta, distingita mondo ankaŭ rabi kaj murdi ne eblas sen vortoj. Tiamaniere post surprize mallonga



HEJS-Kunsido,
nia prezidanto
Ludoviko de Yzaquirre
raportas pri
nia situacio.
Ĉiuj atente lin
aŭskultas.
Estis pli da
HEJS-anoj en
la dekstra flanko,
sed ili ne aperas
en ĉi-fotografajo.

Kiel vi povas
konstati,
la gejunuloj
ankaŭ manĝis
en la 37a
Hispana Kongreso
de Esperanto.
Akceptado en
la ĉampankeloj
"Codorniu" en
Sant Sadurní
d'Anoia.



La ekonomia
situacio
de HEJS
devigis nin
eĉ kelneri.
Jen nia
kunsocietano
Marteno
dum sia
laborado por
nia Junulara
Societo.

ĈIUJ FLOROJ ESTAS FOR

Ĉiuj floròj estas for,
Kie ili estas nun?

Ĉiuj floroj estas for
jam de longa temp'.

Ĉiuj floroj estas for,
Knabin' ilin prenis al la kor'.

Ĉu nun komprenas vi,
ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj knabinoj estas for...
edziniĝis post ador'...

Ĉiuj edzoj estas for...
soldatiĝis kun dolor'...

Ĉiuj soldatoj estas for...
en la tomboj de l' memor'...

Ĉiuj tomboj estas for...
kovras ilin flortrezor'...

MARIJANA

Estas, estas bela maja nokto
Marijana volis veni
al nia rendevu'.

O Marijana, dolĉa eta Marijana
atendos mi nun viĝ, ĉar venos vi.

Pasis, pasis jam la nokto-mezo
Marijana ne alvenis
al nia rendevu'.

Vane, vane floras majaj floroj,
Marijana ne alvenis
al nia rendevu'.



POŝKANTARO

Montaroj de Kanigo'
estas belegaj kaj ĉarmaj,
ĉefe nun en la somer'
Kiam Ĵ akvoĵ estas gajaĵ.

Tri monatojn restis mi
en ili, sen akompano,
krom de iu najtingal'
kiu ĉe la nest' kantadis.

Ĝi kantas je la leviĝ'
de la suno, rozo ĉarma,
-Najtingalo, najtingal':
havu vi bonan flugadon.

Najtingalo mortis jam:
de tri tagoj ĝi ne kantas.
Mi nun volas iri for:
nostalgie mi malgajas.

Trafis min forta malsan'
kun kruelec' senkompata;
neniu komprenis min
nek mian koran malsanon. →

Krom belega knabinet'
Kiu rabis mian amon:
mian amon rabis ŝi,
nur por ŝi la koro batas.

789

LA LINGVO POR NI

Sur montoj kaj step' indianoj
ĉasadas kun ruĝfamili'
kaj se vi postulas parolon
el kanjon' respondus la kri':
REFRENO: Es-pe-ran-to
estas la lingvo por ni, por ni,
Es-pe-ran-to,
estas la lingvo por ni.

En densa afrika ĝangalo
sovaĝaj nigrulo sen di'
jam solvis la lingvan problemon
per tamtam' eliĝas la kri':

Ĉe norda polusoj eskimoj
loĝadas en neĝo, glaci'
se ili bezonas parolon
aŭdiĝas la tuteama kri':

Sur tuta la vasta terĝlobo
en urboj el ĉiu nacl'
triviĝas amideanaro
de buboj elsonas la kri':

Indianoj, nigruloj, eskimoj,
urbanoj kaj buboj kaj mi
jam uzas la Zamenhof-lingvon
de vivu, prosperu la kri':

LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko,
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la Esperantoj
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj:
Sed disseltos la obstinaj baroj
Por la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterne ben'efektiviĝos.

LA NAJTINGALO

(Ama)

KANTO DE L' RABISTO

Dum mi estis en junec',
mi amadis kaj ĝojigis,
kaj nun, jam en plena aĝ',
ne plu vivas bonan vivon.

Mi fariĝis nun rabist',
ĉiutaga belmetio.
Transportiston rabis mi,
revenintan el foiro.

Monon mi rabis de li
kaj al li lasis nenion.
Kiam min satigis mon',
tiam mi rabis knabinon:

rabis ŝin falsa promes'
ke ni poste geedziĝos.
Ho adiaŭ, bela flor',
brila stelo de l' tagiĝol

Ekfluganta a' Francujo
najtingal':
vi salutu la patrinon,
najtingal',
per tril',
fluganta
najtingal'
sen fal'.

Vi salutu la patrinon,
najtingal',
sed neniam mian patron,
najtingal',
per tril',
fluganta
najtingal'
sen fal'.

Ĉar li min tud-edzinigis,
najtingal',
al pastisto min alligis,
najtingal',
kun tril'
fluganta
najtingal'
sen fal'.

GUANTANAMERA

De kie kreskas la palmoj
mi venas homo sincera
por kanti simplajn korkantojn
al mia mondo mizera.

Guantanamo,
guantanamo, guantanamo,
guantanamo,
guantanamo.

La kantoj spiras helverdon
kaj spiras ardon brulruĝan
kaj kiel cervo vundita
en montoj serĉas rifuĝon.

Mi disdividas la sorton
kun la mizera homaro
ĉar la monta tarento
ĝojigas min pli ol maro.

TERZINKA

Terzinka, Terzinka, Terzinka fruleviĝis
Al la knab' sopiris ŝi.
Balkono, balkono, balkono ŝi
romantis,
Al la knab' sopiris ŝi.
Arbare, arbare, arbare ŝi
vagadis.
Al la knab' sopiris ŝi.
Al Dio al Dio, al Dio ŝi
preĝadis
Al la knab' sopiris ŝi.
En fulgon, en fulgon, en fulgon
ŝi sidiĝis,
Al la knab' sopiris ŝi.
Tut' nigran, tut' nigran, tut' nigran
konstajlon havis
Al la knab' sopiris ŝi.
Banejon, banejon, banejon
vizitadis
Al la knab' sopiris ŝi.
AL TEJO, al TEJO, al TEJO ŝi
aliĝis

KAVALIR' DE LA TABLU RONDA

Kavalir' de la tablo ronda,
ĉu al vi plaĉas blanka vin'?

REFRENO: Ĉu al vi, jes, jes, jes,
ĉu al vi, ne, ne, ne,
ĉu al vi plaĉas blanka vin'.

Flari vin' kiu bonodoras
ĉiam estas granda plezur'.

Trinkos mi kvin aŭ ses botelojn,
belulin' sur mia genu'.

Pam, pam, pam, iu batas pardonon,
ho terur', estas ŝia edz'.

Aĉa edz', satan' lin forportu,
ĉar pro li ne plu estas ĝoj'.

Post mia mort' entombigu min
en la kel' kun bongusta vin'.

La pied' kontraŭ la murego
kaj la kap' sub barelotru'.

LA NIGRA BLATO

La nigra blato (x2)
jam ne povas kanti plu
ĉar ĝi ne povas,
ĉar al ĝi mankas
el la postaj kruro du.

Al maljunulino petis
maljunul' aferon seksan,
sed la virino respondis:
mi pri tio estas ekxa.

La nigra...

Oni diras ke la vento
same kiel virin' estas,
ĉar ĝi iras ĉiam tuje
kien pli da varmo nestas.

Ie meze de l' arbaro
juna paro de amantoj,
kiam ili sin kisadis,
aŭdis sonojn de fekantoj.

6 LA GLORKANTO DE UEA

Mi konis delegiton de UEA
mi konis delegiton fervora pli ol mi
fervora pli ol mi.

Li portis la jarlibron / en sia poŝ' kun si.
Ĉar dum la festo manĝo / li manĝis pli ol tré.
Kaj kun la prezidanto / je sano trinkis li.
Nun sekvis la kunsido / de l' granda asoci'.
Konforme al statutoj / raportis ĉiuj pri.
La multenombraj servoj / sur la teritori'.
Sed nian delegiton / ekkaptis emoci'.
Ĉar pri la utileco / neniom sciis li.
Ii diris: "Karaj membroj / ni venis tien ĉi".
En tiu ĉi momento / forkuri devis li.
Rezultis el agadoj / kolik' kaj kompani'.
Ho ve! en necesejo / ne estis flug-foli'.
Kaj tiam la jarlibro / utilis tre al li.
Ni kantu, do la glorojn / de l' granda asoci'.

U E A

AL MI PLAĈAS...

Al mi plaĉas la pipiriripipi
de trinkata botel', pororopop
Je la pipiriripipi',
je la popororopopo',
kiu ne ŝatas trinki vinon
estas animal', estas animal',
granda animal'.

Per kiam mi mortos,
estas ordoninta
mi en testamento:
'Enterigu min (dufoje)
'en profunda kelo,
'sub malnova kuvo,
'havante vitafojn
'en la tuta buŝ'. (x2)

TEJO

ALAUĎETO

Alaŭĉeto, bela alaŭĉeto,
alaŭĉeto, senplumiĝu nun.
Sen plum' estos via kap', (x2)
Ĵes la kap', Ĵes la kap',
kaj la ..., kaj la....
Hoooo. alaŭĉeto...

Sen plum' estos via bek'.
Sen plum' estos via kol'.
Sen plum' estos via naz'.
Sen plum' estos via Brust'.
Sen plum' estos via orel'.
Sen plum' estos via dors'.
Sen plum' estos via krur'.
Sen plum' estos la postaj'.
Sen plum' estos la pied'.
Sen plum' estos via vost'.

DONNA DONNA (JIDA)

Jen sur ĉaro al foiro
triste staras Bovid' en plor'.
Supre flugas kun zefiro
Jen hirundo en danda sor'. ♪

REFRENO: Sed la vento ridas
ridas kun fier'.
Tagon kaj vesperon plu,
tra tuta la somer'.
Donna donna donna donna,
donna donna donna don.
Donna donna donna donna,
donna donna donna don.

"Ĉesu plandi" diris viro,
"Ĉar bovido naskiĝis vi.
Al bestaĉo sen flugilo
decas rampi sen plenda kri'

REFRENO:

La bovidoj sen espero iras
vice al buĉej'.
Sed ja ĉiuj al libero
de l'hirundo sopiras plej.
Donna donna donna donna,
donna donna donna don.
Donna donna donna donna,
donna donna donna don.

HIMNO AL KUNLOĜADO

Venas jen samideanoj sub serena la ĉiel',
peze pendas de la manoj la valizoj kun la ŝvel'.
Sed antaŭen, niaj anoj, jam proksimas nia cel'.

REFRENO: Vivu, vivu kunloĝado, gardas nin la
verda stel'. (du fojoj)

Antaŭ ĉio nin akceptas Lia Moŝto la kasist',
la monujon li neglektas, ne utulus ja protest'!
Do fidele ni respektas la kotizon sen rezist'.

Kaj atendas nin severaj la gvidantoj kun minac',
dum la tagoj senbieraj ni lernados sen grimac'.
Sed ne plendu ni mizeraj, ni ne loĝas en parac'.

La slogano sorĉe krias: "Ĉiam nur en Esperant'!"
Jam paroli ekfobias ĉiu ŝafo-komencant':
La spertuloj tamen scias: estas ĝi reklama kant'.

Sed dum nokto ni eksentas la solecon de l' anim'
nin allogas, dolĉe tentas la loĝejo por virin'.
Sed domaĝe ni prudentas, ne transiros tra la lim'.

Sed ne iu Julieta elŝteliĝos por parol',
mi, Romeo, estos preta ŝin brakumi por konsol'.
Kaj por rendevu' dueta ne necesos protokol'.

Do ni umos je umumo por uminda harmoni'
Ĉar umante en reumo umai umoj umos pli



AE

O

W

C

Q

VIVU LA STEL'!

lenigu la glason, ho ĉiu bonul',
vu la verda stel'!
j kantu la homaj el ĉiu angul',
vu la verda stel'!

REFRENO:

vu la, vivu la, vivu la stel',
vu la, vivu la, vivu la stel',
vu la stel', vivu la stel',
vu la verda stel'!

lenigu la glason kaj tostu kun mi,
vu la verda stel'!
lingvo kreita por ĉiu naci',
vu la verda stel'!

er voĉoj de nia kunbatalantar',
vu la verda stel'!
sonu la voko sur tero kaj mar',
vu la verda stel'!

KATJUŜA

Floras arboj pomaj, piraj plene.
Ĝens'nebulas super la river'.
Venis el la dom'katjuŝa ĝeme
krutan, altan bordon kun sufer'. (x2)

Ŝi elvenis, kantis nun dolore
l' eglon bluan sur la step' sem fin',
al la batalant' amata kore,
al la kara fora. Ho knabin'.

Ho, vi, milda kanto de l' knabino,
flugu alten al la ruĝa sun',
al la trans la fora landolimo
donu kisojn de Katjuŝa nun.

Ho, defendu teron patrolandan
kaj aŭskultu kiel kantas ŝi.
Por ŝi finakiru venkon grandan
kaj Katjuŝan ŝirmu brave li.

TUTE NE GRAVAS

JUKAJDI', JUKAJDA

REFRENO:

Sciu nu, samidean',
jukajdi', jukajda',
ke dependas via san',
jukajdi', ajda',
de regula bonhumor',
kaj ĉiama senlabor'.

Jukajdi', jukajda',
jukajdi', ajdi', ajda',
jukajdi', jukajda',
jukajdi', ajda'.

Laŭ spertita homo kon',
plej utila estas mon'.
Tial de naskiĝu vi
en riĉega famili'.

La virinoj, jes, en ver',
taŭgas tre por amafer'.
Prunteprenu sen cinik'
la edzinon de amik'.

Kaj por peli zorgojn por
taŭgas ĉiam la likvor'.
Tial trinku kun kuraĝ'
eĉ dum plej maljuna aĝ'. →

Sed tute ne gravas ĉar ni amas nin
Holadie', holadio'
Adam' batas Evan per sukerbeto je postaj'.
Holadie', holadio'.

Al ni plaĉas brando, la naza tinktur',
Ja en nia vivo abundas plezur'.
Ni manĝos kaj drinkos ĝis igos aŭror'
eĉ post elĉerpiĝo de l' mona trezor'.

La domposedanto revenas al mi.
Li postulis sian monon sed nun volas pli.
Sed mia invito al gaja diboĉ',
forpelas la zorgojn, neniu riproĉ'.

Al sanigo de l' stomak'
helpas ĉefe la tabak'.
Tial fumu dum la viv'
pli ol eĉ lokomotiv'.

Kaj se malgraŭ la princip'
ne plu fumas via pip'
estas tial ke, sen dub',
malpuriĝis ĝia tub'.



KLEMENTINO

En kanjono, en kaverno,
laborante en la min',
estis patro, vera mastro
de filino klementin'.

REFRENO: Mia kara, (x2)
mia kara Klementin',
vi perdiĝis nun por ĉiam
bedaŭrinde, Klementin'.

Elefante tre gracia,
delikata pezulin',
ligna kesto, taŭga vesto
por pied' de Klementin'.

Anasidojn al la akvo
ŝi kondukis laŭ rutin';
falis glite kaj subite
subakviĝis Klementin'.

La vezikoj el la buĉo
bubalsone tiris sin.
Mi kuraĝas, sed ne naĝas
tial dronis Klementin'. ♣

Ŝia patro velkis tage,
ĉar li tiel perdis ŝin.
Li deziris kaj li iris
esti apud Klementin'.

En la sonĝoj ŝi aspektis
tre ampleksa marvirin',
faras gestojn, kissugestojn,
sed "ne, dankon, Klementin'."

Al mi mankis, dolorige,
al mi mankis Klementin'.
Mi forgesas, mi konfesas,
pro la kisoj de fratin'.

MARIŜA

Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amas sin,
nur neniu junuleto amas min.

REFRENO:

Mariŝa, kisu min, sen peto al patrin'
ŝi juna same faris, pri l' kisoj ne avar

Batas panjo, batas panjo, batas min
ke mi amas, ke mi kisas, knabo, vin!

Sidas panjo, sidas panjo sur kortet'
kaj mi estas en kamero kun knabet'.



BOLIVIA ARMEISTO

Armeisto bolivia,
bolivia armeisto,
tenas vi vian fusilon
fabrikitan en Usono,
fabrikitan en Usono,
bolivia armeisto,
fabrikitan en Usono.

Al vi donis ĝin Barjentos,
bolivia armeisto,
donacon de Mister Ĵonson
por murdigi al via frato,
por murdigi al via frato,
bolivia armeisto,
por murdigi al via frato.

Ne scias vi kiu mortis,
mortis Ĉe Gevara,
Argentina kaj eĉ Kuba.

Li estis plej bona amiko,
amiko por malriĉuloj
de la norde ĝis la sudo.

Tristiĝis mia gitaro,
tristiĝis, sed ne ploras,
malgraŭ plori estas homa. ♣

ESPERANTO, BELA ESPERANTO

Esperanto, bela Esperanto,
Esperanto; lernu ĝin kun mi

1. Lernu pri la alfabet',
lernu pri la alfabet!
Alfabet', alfabet'!

Ho, Esperanto, Bela Esperanto,
Esperanto, lernu ĝin kun mi

2. Lernu pri la gramatik!
3. Lernu pri la elparol'!
4. Lernu pri literatur'!
5. Lernu pri la U.E.A. !
6. Lernu pri la mondkongreso!

Ne ploras ĝi ĉar nun
ne estas larmo nek ŝuko
sed glaveto en la mano.

Ke vin por ĉiam aĉetas,
per mono, kiun vi ricevas,
tion pensadas kanĝjlo.

Tamen vi iam lernos,
ke oni ne mvrdu fraton,
estas krimo murdi fraton.



*

*



Reveninte hejmen el varma banejo
 Mi pasis ĝardenon de olda moskeo,
 Kaj tie en ombro de unu jasmeno
 Belega Emina, staris en ĝardeno.

REFRENO: Aŝik' Aiŝa' jabaŝa
 sur ĉevalo subaŝa'.

Ho kiel belega! Kun kalik' en manu
 La plej bela estas ĉe nia sultano
 Kiam ŝi ekiras kaj ŝultojn akmovas
 Eĉ hoko la amon haltigi ne povas.

Mi salutis inon, alvokis la dion
 Ŝi silentis tie, kaj diris nenion.
 Belega Emina, floro de Alaho
 Arĝentan kalikon plenigis per akvo.

Ŝi akvivis florojn per arĝent-pokalo
 Kun vento ludema en bela hararo
 Kiel flor`printempa hararo ekfloris
 Ekscitita tute jen mi preskaŭ falis.

Mi preskaŭ stumblis, ho kredo islama
 Emina ne venis, restis ĉagren`flema
 Ŝi ne konsideras mian amon grandan
 kvankam pro am`ŝia mi estas mortanta.

MI TRINKU

Ni trinku geamikoj
 sen penoj nek devigoj,
 ni trinku geamikoj
 sen penoj, kun muzik'.

Li (ŝi) trinku (7 fojoj),
 ne plu!

DEK BOTELOJ

Dek boteloj pendas de la mur',
 dek boteloj pendas de la mur',
 sed se akcidente falus unu nur,
 tiam...
 naŭ boteloj...

unu botelo pendas de la mur',
 unu botelo pendas de la mur',
 sed se akcidente falas unu nur,
 tiam nur odoro restas sur la mur'.

2.- La lingvo por ni	Al mi plaĉas...	6
La espero	Alaŭdeto	9
3.- Ĉiuj floroj estas for	Apudmoskvaj vesperoj	4
Marijano	Bolivia armeisto	15
4.- Montaroj de Kanigo'	Ĉiuj floroj estas for	3
Apudmoskvaj vesperoj	Dek boteloj	14
5.- Ĝuantanamera	Donna, donna	9
Terzinka	Emina	14
6.- La glorkanto de UEA	La espero	2
Al mi plaĉas...	Esperanto, bela Esperanto	15
7.- Kanto de l' rabisto	La glorkanto de UEA	6
La najtingalo	Ĝuantanamera	5
8.- Kavalir' de la Tablo Ronda	Himno al kunloĝado	11
La nigra blato	Jukajdi', jukajda'	12
9.- Alaŭdeto	Kanto de l' rabisto	7
Donna, donna	Katjuŝa	10
10.- Vivu la stel'	Kavalir' de la Tablo Ronda	8
Katjuŝa	Klementino	13
11.- Himno al kunloĝado	La lingvo por ni	2
12.- Jukajdi', jukajda'	Marijano	3
Tute ne gravas	Mariŝa	13
13.- Klementino	Montaroj de Kanigo'	4
Mariŝa	La najtingalo	7
14.- Emina	Ni trinku	14
Ni trinku	La nigra blato	8
Dek Boteloj	Terzinka	5
15.- Bolivia armeisto	Tute ne gravas	12
Esperanto, bela Esperanto	Vivu la stel'	10



"Laŭ kutimo de nia tempo, okazis vigla diskutado inter la junuloj kaj la maturuloj pro malsameco de vidpunktoj. Tamen, ĝio finiĝis konkorde. Tio montras ekeploton de vigleco, ĉiam preferinda ol la silenta velkado."
G. Moya en "Boletín" n-ro 222, julio-aŭgusto 1977.

"La Prezidanto de HEJS persistadis por plena aŭtonomeco por la junularo. La Prezidanto de HEF ne neis tiun aŭtonomecon, sed li opiniis, ke oni devas atendi ĝis kiam la menciita statuto estos ŝanĝata. La juna Izaguirre, la nura junulo kiu parolis (kaj Marteno kaj Moretó kaj Oscar, ĉu ne sufiĉe laŭte?), arde opiniis, ke oni povus tion aprobi en la eksterordinara kunveno, sed laŭ leĝaj normoj, tiu punkto ne povus esti traktata, ĉar ĝi ne troviĝis en la tagordo. Ofte la diskutado fariĝis teda kaj enuiga."
Luis Serrano Pérez en "Sabadell Esperantista" n-ro 138, septembro-oktobro 1977.



Fine,
interkonsentitan
aŭtonomecon
por
HEJS.
Niaj
mienoj
spegulas
nian
ĝojon.



La fondinto de HEJS
Salvador Aragay
dum sia interveno en
la Kongreso.




La nuna prezidanto de HEJS
Ludoviko de Yzaguirre
salutante la ĉeestantaro
nome de nia Societo.



HEJS ankaŭ aktive
partoprenis
la 33an Internacian
Junularan
Kongreson de
TEJO en
Poitiers dum
ĉi-aŭgusto.
En la fotografajo
vidiĝas la kongresa
anonctabulo
kun algluita
reklamafiŝo
de HEJS-revuo.

Fotiŝ:
Josep Serés (Cervera)
Amri Wandel (Tel Aviv)

AMUZE KONGRESI AŬ KONGRESE AMUZI



Kutime, kiam mi aŭdas paroli pri kongresoj, mi imagas tuje kelkajn bonvestitajn sinjorojn, kiuj multe paroladas pri teknikaj kaj specialigitaj temoj en kunvenoj, asembleoj kaj prelegoj. Pro tio ĉiam ŝajnas al mi, ke ĉeesti kongreson estas ĉeesti teknikan laborkunsidon, kiu multfoje fariĝas teda kaj la ciga.

Sed tamen, tio ne estas certa, almenaŭ en la kongresoj de TEJO, kiel mi kongatis en Poitiers, kie la kongresanaro, krom laboradi, amuziĝis. Jam en la programo de la kongreslibro ni ĉiuj vidis, ke la kongreso estus riĉa en dis-trigaj aranĝoj. Sed fakte la kongreso estis pli amuza ol laŭ la oficiala programo.

Matene, la kongresanoj laborkunvenis en grupoj pri antaŭelektitaj temoj. Kelkfoje tiuj laborgrupoj devis ĉesi subite sian diskutadon, ĉar la frua tagmanĝado, je la 12a tagmeze, atendis nin.

Posttagmeze, ĉar la programitaj aranĝoj estis malmultaj, la plimulto de la kongresanoj havis grandan libertempon, kutime uzita por interkonatiĝi kun alilandaj geamikoj, por kanti en granda rondo sur la herbo, ludante gitaron aŭ akordionon, por lerni la konstruadon de japanaj pupoj aŭ por viziti la belan urbon Poitiers per tro kosta aŭtobuso.

Nokte, ni partoprenis la programitajn amuzajn aranĝojn, kiuj tiucele okazis. En la interkonatiĝa vespero, la etoso estis iom malvarma malgraŭ spontanea gitarludado; tamen mi interkonatiĝis kun kelkaj interesaj gesamideanoj, kun kiuj mi longe konversaciis.

La sekvinta nokto ni iris al proksima dancejo, kie ni povis danci ĝis matene. Ŝajnas al mi, ke kiam oni disaŭdigis per la voĉlaŭtigiloj la kanzonon "Viva España" (Vivu Hispanio) la nuraj homoj kiuj ne kantis ĝin estis la katalunoj.

Alia nokto ni ĉeestis la teatran ludadon de "La Justuloj" de Albert Camus, ludadon faritan de niaj geaktoroj de TESPА (Teatro Esperanta de Parizo). Ĉar ilia alprezentado estis bonega kaj la temo de la verkaĵo estis ege interesa, la aktora teamo ricevis laŭtan aplaŭdadon de la ĉeestantaro, kiu sekve komencis la ludadon kaj demandis al la geaktoroj pri detaloj de ilia rolado.

Vendrede okazis literatura vespero, aranĝita de LITERATURA FOIRO, prezentita far ĝia ĉefredaktoro, Giorgio Silfer. Mi konstatis, ke ĝi estis unu el la plej gravaj aranĝoj de la kongreso, ĉefe pro sia lingva altnivelo. Tiu literatura vespero konsistis el la elekto de la verko de la jaro 1976, kaj oni elektis la romanon de Claude Piron Ĉu vi kuiras ĉine?

La sekvantan tagon okazis sukcesa kabareda vespero, kiu komenciĝis per pulbazara konkurso por elekti la plej aĉan verkon de la jaro, organizita de LA KANCERKLINIKO. La konkurso, kiu estis komika imitado de la antaŭa literatura vespero, multe plaĉis al la ĉeestantaro. Poste, s-ano Boulet, organizanto de la venonta Franca Kongreso, rolis "Parolad' omaĝo" (Jam prezentita en Sabadell dum la 37a Hispana Kongreso), kiu ankaŭ meritis fortan aplaŭdodon. Post tio, la itala s-ano Giulio Gappa kantis kelkajn politikajn kantojn, sciigante al ni dum sia kantado, ke unu el la arestitaj anarkistoj post la atenco en la Piazza Fontana, en Milano, estas esperantisto. Ĉiuj liaj kantoj estis fortege kaj longe aplaŭditaj. Poste aktoradis du junulinoj de TESPA, kiuj prezentis mallongan sketĉon, kaj sekve kantis Jack le Puil, kune kun du gejunuloj, kiuj lin akompanis per gitaroj. Ankaŭ kantis eksterlandaj grupoj, inter kiuj ni rememoras la jugoslavan (eble pro ĝia donaco de ruĝa vino), la germanan, la izraelan kaj alilandajn.

Fine, oni ludis veran kabaredan dancon, kiu tiel plenumis sian devon, anoncitan de la vespera nomo.

Dimanche, ni ekskursis tuttage tra la bela regiono Poitou, vizitante kelkajn kastelojn kaj preĝejojn dum nia vojaĝo ĝis la Abatejo "De la Reau", kie ŝafrostado atendis nin.

Lasttage okazis la adiaŭa vespero, konsistigita el teatra ludado fare de s-ano Boulet kaj sekve okazis konkurso por elekti la plej belajn virajn gambojn, konkurso kiu estis tre sukcesa kaj amuza (almenaŭ por la ne-partoprenantoj).

Krom la programitaj aranĝoj, la kongresanoj amuziĝis ĉiunokte, restante en la trinkejo ĝis ĝia fermo dancante sen ŝuoj per akordiona muziko, aŭ kantan-te naciajn kaj internaciajn kantojn de ĉiuj konatajn, kiel la Internacio, kiun ni kantis ĉiu en sia propra lingvo samtempe. Ĉiam kaj ĉie la akordiona muzikisto, dana blonda junulo akompanis nin dum niaj kantoj.

Kutime, kiam la trinkejo fermis siajn pordojn, ni daŭrigadis nian diboĉadon ĝis la 3a aŭ la 4a matene, nin distribuante en niajn malgrandajn dormoĉambrojn, tiel ke en unu ĉambro estis iam eĉ dekkvin personoj.

Io tre interesa estis la festetoj organizitaj por samlandanoj en dormoĉambroj, invitante kelkajn fremlandanojn ĉeesti ĝin. Mi povis ĉeesti la anglan feston, la izraelan, la danan, la francan, kaj aliajn, kiuj mi ne rememoras, ĉar mi eble estis dorminte tie.

Estas rimarkinda la hispana festo, kie oni preparis alkoholan hispanan trinkejon "queimada", kiu certe plaĉis al la ĉeestantoj, inter kiuj estis, krom la hispanoj, homoj el Kanadio, el Belgio, el Katalunujo, el Grekujo, el Italio; kaj eĉ ĉeestis onta altestrarano de TEJO.

Estas bedaŭrinde por niaj karaj komitatanoj, ke tiuj amuzaj vesperoj okazis multfoje je sama horo kiel iliaj komitat-kunsidoj, kaj ili ne povis partopreni ĝin. Nek en la matenaj aranĝoj nek en la vesperaj, ili povis partopreni, ĉar ili kunvenis dumnokte post la kabareda vespero, ĝis la 5a matene. Ne estas bona afero esti komitatano en Kongresoj!

Héctor Puig

tempo disfalis la tuta civilizacio.

Kaj la vortoj, en sia nek-onata, nova hejmlando vivis feliĉe kaj libere. Ili forgesis la jarojn de la mizero kaj senhonorigo. Ili kreis riĉan kaj profundan sencon, por si, laŭ

siaj propraj konsciencoj kaj ili pliriĉiĝis per tute novspecaj, koloraj kaj belsonaj partikloj. Ili eĉ hodiaŭ vivus, se mi ne estus vekiginta.

(1938).

GYORGY BALINT (1906-1943)

El la hungara trad. A. Reiber

Ĉerpita el "LA NICA LITERATURA REVUO"
Kvara Jaro. Numero 5 (23) Majo-Junio 1959
Paĝoj: 182, 183, 184.



SPRITAĴOJ EL LA ARKIVO

MALOFTA KAPTAĴO

Dum sinjoro akompanata de sia hundo pririgardas la montran fenestron de magazeno de bongustaĵoj, la vosto de la hundo ialas en la korbon plenigitan kun vivaj omaroj starantan apud la pordo. Ĉar omaro firme sin alpinas al la vosto, la hundo turmentegata pro doloro kriegante forkuras, fortrenante la omaron kun sia vosto. Tion ĉi vidas la posedanto de la magazeno kaj alvokas ekkolereme al la sinjoro:

Sinjoro, fajfu do al via hundo!

La sinjoro: Ha, pro kio do? fajfu do al via omaro!

Ĉerpita el "La Spritulo" n-ro 1



Nove establita kuracisto (mallaŭte): Friĉjo
kiom da pacientoj estas tie?

Servisto: Refoje tute neniu.

Kuracisto: Ĉu vi denombriis ankaŭ ekzakte?

Ĉerpita el "La Spritulo" n-ro 1



LA SKOLTA MONDO



Komence de Decembro la prezidanto de Skolta Esperanto-Ligo faris sukcesplenan viziton al la Monda Oficejo de Skoltina Movado en Londono.

La nova direktorino de la Oficejo f-ino Lyn Joynt plene komprenas la valoron de Esperanto por internacia asocio, kaj eĉ iam lernis ion de nia lingvo.

Kiam en aprilo 1977 kunvenos la Monda Komitato, ŝi proponos la akcepton de Esperanto kiel kvara oficiala lingvo de la Skoltina Movado, post la franca, angla kaj kastila.

Interesuloj kaj simpatiantoj de "SKOLTA ESPERANTO-LIGO" petu informojn rekte al la NACIA REPREZENTANTO (NR) s-ro S. Aragay, Bassegoda 40-3r-1a, Barcelono-14.

La organo de SEL "LA SKOLTA MONDO" atendas vin. Abonkotizo: 100,- pesetoj.



PERE DE LA ĈI-APUDA
ALGLUAĴO, KIES KATALUNA
TEKSTO SIGNIFAS "LIBERECON
DE ESPRIMADO", ONI MILOPE
REKLAMIS LA RESPEKTON DE
TIU FUNDAMENTA RAJTO: LA
RAJTO JE LIBERA ESPRIMADO.
NI, KIEL KULTURA ORGANIZO
BAZITA SUR LA RESPEKTO DE
LA HOMAJ RAJTOJ, APOGAS TIUN
KAMPANJON.



ESPERANTO

ĈU VIVANTA LINGVO?

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Rejkjavik de la 31-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto, ĝin partoprenante 1200 delegitoj el 41 landoj. (La delegitaro el la franca ŝtato, 143 homoj estis la plej multnombra en la islanda ĉefurbo)

Esperantlŭve la prezidanto de la Respubliko, S-ro Kristjano Eldjarn, alsendis dum la malferma ceremonio siajn salutojn al la kongresanaro. Ankaŭ la urbestro kaj la ministro pri kulturo, kiuj ĝia tiam estis rifuzintaj paroli publike alian lingvon ol la islandan, turnis sin esperantlŭve al la kongresanoj. Nur la ĝenerala direktoro de UNESKO, S-ro M'Bow, oficiala vizitanto en Islando, faris sian paroladon france. La soleneco de tiu malferma kunveno kontrastis la "saĝa-infanecon" kaj malkonformecon de la ĉeestantaro. Esperantistoj optimistas.

Ĉu internacia lingvo aŭ humanisma idealo? Ĉu komunika pero aŭ kontribuo al la plibonigo de la komprenado inter homoj? Ĉu nura ilita aŭ mesaĝa perilo? Ĉu oni estas "esperantisto" aŭ "esperantparolanto"? Ekde ĝia kreo de D-ro Zamenhof en 1887, Esperanto naskis ja vere multajn diskutadojn.

Kaj la aŭstralianoj kaj la japanoj venintaj al Rejkjavik por ĝui la "freŝan belecon" de la islanda somero parolas la tutnormalan Esperanton. Tiu ĉi lingvo, kiu baldaŭ centjaraĝos, kaj kiu eĉ rezistadis la subitajn postenirojn okaze de la du mondmilitoj, estas jes ja vivanta.

La kongreso, uzante la islandan universitatejon kaj du ĉefurbajn kinujojn, pritaktis ĉi tiun jaron la rajton je interkomunikado. Sed gravegaj eroj estis ankaŭ la studoj prezentitaj de la internaciaj fakaj Asocioj: metiaj asocioj de arkitektoj, instruistoj, kuracistoj, scienlistoj, filatelistoj, kaj ankaŭ de... ŝakludistoj, ornitologoj, anoj de la Rotary Klubo, ktp. La kongresanoj, trante tra la urbo de uno ejo al la alia por partopreni la laboron de la pluraj komisionoj, gaje intervokis sin trastrate. Ilia komunika gaĵo ja surprizis la islandanojn, kutime malpli sentelmontraj.

Kion diable havas komune anglikana pastro, memlerninta anarkisindikisto, sveda emeritino, japana ekologisto aŭ freinet-a pedagogo? La gramatika facilo de la lingvo ne sufiĉas por klarigi tiun movadon, ne la aktivegan varbadon de ĝiaj subtenantoj.

Esperantistoj ne forgesas la avantaĝojn de la lingvo, sed ĝenerale la filozofia aspekto de E-o estas ilia precipa kerno-punkto. Atingebl de ĉiuj, E-o estas pova perilo por batali kontraŭ la lingva imperirm de la grandaj mondpotencoj.

Kial lerni ĝin? "Ĉar, respondas la esperantistoj, la lingvo de Zamenhof estas pli ol lingvo: ĝi estas projekto por universala interkompreno". Ili ĉiuj kunhavas tiun esperon.

Gerars Lemarquis

Artikolo el la pariza ĵurnalo "Le Monde" aperinta la 7-an de aŭgusto de 1977, sub la rubriko "Edukado"

tradukis. Marteno.

34a



Internacia Junulara Kongreso de TEJO

22-29 julio, 1978

VELIKO TÂRNOVO

Veliko Târnovo estas unu el la plej malnovaj kaj belaj urboj de Bulgario. Ĝi tie estas konservitaj valoraj monumentoj de la bulgara historio kaj kulturo el XII-XIV jc. En la piedoj de monteto "Trapezica" troviĝas la historia preĝejo "Sankta Dimitro", kie en 1185a jaro, la fratoj Asen kaj Petâr proklamis la ribelon de la bulgara popolo kontraŭ la bizanca jugo. De tie komenciĝas la historio de la Dua Bulgara Ŝtato.

Veliko Târnovo estiĝis ĉefurbo. Sur la monteto "Carevec" la bulgaraj reĝoj konstruis grandiozajn palacojn kaj preĝejojn. Ĝi tie koncentriĝis la politika kaj kultu-

ra vivo de la tuta lando. La krutegaj bordoj de rivero Jantra kaj la altaj fortikaĵmuroj faris la urbon nealirebla. Veliko Târnovo konservis multnombrajn monumentojn de la kulturo kaj arto el tiu epoko.

Multe da eventoj el la plej nova historio de la bulgara popolo estas ligitaj kun la urbo. Post la liberiĝo el la otomana jugo (je 1878), ĝi tie en la jaro 1879 kunsidis la unua fonda popola kunveno, kiu akceptis la unuan konstitucion de Bulgario. Kun la nomo de la urbo esta ligitaj ankaŭ la formiĝo de la socialisma movado en Bulgario.

Sed Veliko Târnovo ne estas nur historio. Ĝi estas ankaŭ moderna urbo kun va-

stakoj, parkoj, kaj konstruaĵoj, kun sunaj loĝejoj kaj publikaj konstruaĵoj, kun grandaj industriaj entreprenoj.

Veliko Târnovo, atestanto de multaj eventoj dum la jarcentoj, atendas gastame la partoprenantojn de la 34a Kongreso de TEJO.

La ĉirkaŭaĵo de Veliko T.

En la ĉirkaŭaĵo de Veliko Târnovo troviĝas multe da monaĥejoj, kiuj dum la tempo de la Dua Bulgara Ŝtato fariĝis centroj de vigla literatura vivo.

Inter ili plej famaj estas la monaĥejoj Preobraĵenski kaj Drjanovski, unikaj pro siaj arkitekturaj ensembloj el pasintaj jarcentoj. Dum la epoko de la bulgara Renesanco (XIX jarcento) la monaĥejoj estis azilo de la bulgaraj nacirevoluciuloj.

En la ĉirkaŭaĵo de Veliko Târnovo troviĝas ankaŭ unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Bulgario, nun nacia rezervejo. Multaj domoj kaj preĝejoj en ĝi kun riĉaj internaj dekoraĵoj, kreitaj dum la XVI-XVII jarcentoj, estas unikaj monumentoj de la

bulgara, arkitektura kaj arta heredaĵo.

Urbo de la 34a kongreso

de TEJO

Ĉe Veliko Târnovo, altenleviĝas la historia monteto Sveta Goro de kiu malkovriĝas belega panoramo al la urbo. Sur tiu ĉi monteto troviĝas la universitato "Kiril kaj Metodi", studentaj loĝejoj, kluboj, kaj kafejoj.

Por la kongresanoj la universitato disponigos sian aŭlonkaj aŭditoriojn, konstruitajn konforme al arkitekturaj tradicioj de la urbo. Ĉi tie trapasos granda parto de la kongresa programo-kunsidoj de la laborgrupoj kaj de la komitato, ĝeneralaj kunvenoj, amuz-vesperoj k.a. La programo proponas ankaŭ unutagan ekskurson al vidindaj lokoj en norda Bulgario.

Pli frue aliĝintaj havos laŭplezuron loĝi en la nova studenta domo ĉe la universitato. La aliaj estos loĝigitaj en la urbo.

Tuj post la IJK okazos postkongreso en Varna, dum la 63a UK. Post la UK, la de-

zirantoj povos partopreno
la 4an internacian arkeolo-
gian laborbrigadon, de la
5a ĝis la 28a de Aŭgusto,
kie ili havos senpagan lo-
ĝadon kaj manĝadon aŭ res-
ti ripoze ĉe Nigra Maro.

(Teksto far IJKA LKK)

KOTI/TABELO

por la 34-a Kongreso de TEJO
(22-2).7.1978 - Veliko Târnovo)

	ĝis 78.2.28		ĝis 78.5.31		post 78.5.31	
	lv.	gld.	lv.	gld.	lv.	gld.
ĝis inkl.						
20 j.	62	157	68	172	76	192
21 ĝis						
inkl.25j.	70	177	76	192	84	212
26 ĝis						
inkl.32j.	78	197	84	212	92	232
33j.kaj						
pli	88	222	94	237	102	257

Individuaj membroj de TEJO/UEA/t.e.
nur membroj malpli ol 26- jaragaj /
ĝuas rabaton de 12 gld aŭ 5 levoj.

KOTIZ/TABELO

por loĝoj dum la postkongreso

tagoj	levoj	gld	tagoj	levoj	gld
7	28	77	3	12	33
6	24	66	2	8	22
5	20	55	1	4	11
4	16	44			

La plej bela loĝantaro

La ostoj estis abundaj, sed tio estas komprenebla en urbo, kies loĝantaro estis vivanta skeletaro. Efektive, sur strato en konstanta promenado mi vidis skeletojn, kiuj iris de unu loko al la alia. Strange estas vidi tiun eraran socion, en kiu korpoj sen karno estas ĝiaj membroj.

La ostaj korpoj, se tion oni povas diri, balanciĝis, kvazaŭ tuj disfalus, ruiniĝus; sed male, ili daŭre staris. Por ni, homaj estaĵoj el karno kaj ostoj, tiu loĝantaro, estas simple, vivantaj kadavroj. Sed ne, ili estis skeletara familio. Ili ne havis eĉ la plej malgrandan eron de karno. La ostoj estis interligitaj per specialaj -ni diru- nervoj, tendenoj. La osta rompiĝado estis normala "malsano" inter tiu skeletaro, kiu ajn frapo estis kaŭzo por krevado de kelkaj ostoj, kies krakado eliris timigan bruon. Tamen ilia kuracado aŭ alkroĉigo estis rapida, ili tuj kuracis sin, gluante kvazaŭ soldaĵo, la rompitajn ostojn al sia korpo. Eble pro tio, ke ili ne estis kovritaj de karno, la kirurgia operacio fariĝis rapida, mirakle!

Dum mia mallonga restado inter ili, mi ne kapablis distingi, kiu estis vireca aŭ virinseksa, sed nepre jam devis ekzisti ĝia plimultigo, ĉar ofte estis videblaj malgrandaj skeletoj, kiuj evidentigis sian infanecon.

Tie la vivo estis tre simila al tiu ĉi nia, kvankam tie ne ekzistis multaj el niaj devigaj laboroj pro tio ke ili ne bezonis manĝi. Efektive, por la nutrigado de iliaj ostoj la kontakto de la aero, de la vento, jam sufiĉis, estis, en mia opinio, speciala venteto, kiu konservadis la vivon de la skeletoj.

Tiu skeletaro ankaŭ kantis, sed ili ne havis voĉon. La sonojn de la kanzonoj ili faris pere de siaj dentaroj, kies dentoj estis grandaj, iom similaj al tiuj niaj, tamen pli longaj kaj larĝaj, sed kara leganto, kiaj sonoj, imagu centojn, milojn da tremantaj homaj korpoj pro la malvarmo kaj la bruon, kiun faras iliaj dentaroj. Tiu denta krakado estis ankaŭ la uzata lingvo inter ili, kvankam ofte mi ankaŭ konstatis ke ili frapis siajn ostajn manojn kaj aliaj respondis sammaniere, sed nenion mi komprenis de ilia perosta konversacio.

Verdire la spektaklo estis timiga, tiom da proenantaj skeletoj. Iam mi vidis iujn skeletojn bataladi inter si. La bruo de la rompiĝintaj ostoj estis impona, troviĝis ostoj, kiuj apartenis, ni diru, al la kruroj, kranio ..., fakte ili disprenis la rompitajn ostojn kaj ilin gluis al la apartenantaj kaj respektivaj lokoj de la skeletaj korpoj. Necese estas aldoni, ke ne ĉiu vundita aŭ difektita skeleto restis perfekta.

En tiu stranga mondo min rigardis kiel esceptaĵon kaj kompatinda estaĵo, pro tio ke mi devis toleri kaj suferi la kunportado de mia karno, senutila laŭ ili, krom tio, ke oni rigardis min kun timo, pro la fakto ke mia karno, en ilia opinio, flaras malbone kaj povas kunporti malsanojn por iliaj ostoj.

La vetero en tiu neimagebla urbo, estis tre simila al ĉi tiu nia. De tempo al tempo ankaŭ okazis ŝtormoj kaj anekdote mi povas rakonti al vi ke kiam la grajlaĵoj frapas ilian ostan korpon la bruo fariĝas timiga. Tiu stranga loĝantaro malofte, apenaŭ uzas siajn ŝirmejojn aŭ domojn.

En tiu stranga socio ĉio estas kun funebraj kaj tombaj aspektoj. Jes, en tiu nekredebla skeletara urbo ne ekzistas grandaj domoj, ankaŭ ne estas purigejoj, nek necesejoj, ĝi estas urbo malplena.

Kuriozaĵo estas ke tuj oni konas kiu estas juna aŭ maljuna. La ostoj de junaj -homoj- estas pli brilaj, blankaj, pli bone ordigitaj, en la maljunuloj la ostoj montras la forpason de la tempo kaj ili estas nigraj, facile oni povas konstati, ke malgraŭ la kuraciga venteto la ostaro ankaŭ putriĝas, la junaj skeletoj piediras multe pli rapide ol la maljunaj.

Ĉu ekzistas la morto en tiu socio?, mi pensas ke jes, ĉar iam mi vidis amason da ostoj, kiuj estis kunportitaj for, en difinitan lokon. La vivo de tiu skeletaro estis senzorga, pri nenio ili devis okupiĝi ĉar nenion ili bezonis. Neniam militon mi vidis, sed mi pensas, ke milito aŭ similaĵo jam devis ekzisti, ĉar iuj ostoj estis traboritaj, kaj ili havis truojn, precipe ĉe la la ostoj de kranio, do, tiuj truoj evidentiĝis, ke io ne normala okazis. La armitoj povus esti etaj kaj specialaj ŝtonetoj kaj la propaj ostoj. Ĉu ne? Mi neniam vidis tion, kion oni povus nomi soldataro. Kiu ordonis en tiu senkarna socio?, mi tion ankaŭ ne povas certigi, sed mi opinias ke la altaj skeletoj estis la estroj, mi tion diras, ĉar surstrate ĉiu malpli alta skeleto apartiĝis aŭ cedis sian terenon al tiu alta.

Kompreneble ne estis transportiloj, ĉar nenio estas por translokiĝo. La skeletoj por iri de unu loko al alia, ĉiam iris piede, ĉar ili ne havis karnon, ilia pezo permesis al ili marŝi tre rapide.

Mi jam diris ke neniam mi distingis, kiu estas viro aŭ virino, sed surstrate mi vidis skeletojn junajn, kiu kuris post alia skeleto juna ankaŭ, kvazaŭ unu amindumus la alian, ĉu tio, estis ilia amoro?

La estado inter tiu skeletaro ne estis agrabl. Ĉiam vidante marŝantajn ostojn, kiuj sin ligitaj per tendenoj kaj kies fantoma aspekto timigis min, krom la dispecigitaj ostoj sur la stratoj
....

Luis Serrano Pérez

50^a KONGRESO DE S. A. T.

En la lasta tago de la HEF-a Kongreso, en Sabadell, ni ekdecidis ĉeesti kongreson de SAT, en Aŭgsburgo, de la 30-a de julio ĝis la 5-a de Augusto, por ekkoni tiun esperantistan laboristan organizon kies membroj ni estas sed, ĝis nun, ne aktivaj.

Jaŭde 28-a de julio, ni vojaĝis trajne de Barcelono Aŭgsburgon. Pluvis vendrede, vespere ni alvenis al la kongresa urbo, sed neniŭ kongresafiŝo en aŭ ĉirkaŭ la stacidomo opiniigis, ke ni ne eraris (sabate, ni sciis ke en ĉi tiu tago estis aŭtubusa servo de la stacidomo ĝis la kongresejo). Kun stratplano donita de la informoficejo de la stacidomo ni povis alveni al la Kongresejo. Tie nur estis esperantisto, al kiu ni demandis pri iu proksima kampadejo. Li diris ke tiu proksimeco ne ekzistis ĉar la kampadejo estis je 10 Km. Bone ni ekdecidis dormi en la stacidomo. Nia kunulo bonŝance ne permesis tion al ni kaj ni povis tranokti en komforta lito en la kongresejo mem. Estis la unua el la multaj pruvoj de solidareco de la laborista esperantistaro.

Sabate, ni parolis kun la kasisto de la kongreso, tiel kiel diris al ni vendrede tiu esperantisto, pri nia ekonomia problemo. Nur ni devis pagi por dormi en la kongresejo. Denove la solidareco surprizis nin.

En la interkona kaj revida renkonto, kelkaj gejunuloj, observante nin izolitaj integriĝis al la grupo, kaj aŭtomate ni troviĝis inter kunuloj kiuj interesiĝis pri ni, pri nia lando, pri la politika situacio. La limoj, psikologiaj limoj estis rompitaĵoj.

Pluvega tago estis dimanĉo. Pro tio, matene la blovorkestro devis plezurigi la kongresanojn - sub la plafono de la urbodomo, kaj ne en la placo. En la sama urbodomo estis la malfermo: la urbestro, la delegitoj, .. parolis al la ĉeestantoj.

Postagmeze ĉar ni ne povis viziti la urbajn ĉefaĵojn, por distri nin eniris al kinejo. Pri la filmo estas preferinde ne paroli.

Estis tri laborkunsidoj, lunde, marde kaj merkrede. En la du unuaj tagoj oni pritaktis diversajn aferojn kaj la fakoj raportis pri la pasinta jaragado. La ne sufiĉa partopreno, la perdo da membroj, la maljuniĝo, la junulfako, Sennaciulo sia aspekto kaj la artikoloj, la 2-a eldono de PIV kaj siaj korektoj, literatura broŝuro, k.a. estis kelkaj el la temoj pritaktitaj. En la tria laborkunsido oni diskutis la gvidrezolucion.

La 50-a Kongreso de SAT, konstatante la ekonomian krizon proponas mondvastan malarmadon, malaperon de landlimoj, lukton kontraŭ racismoj - kaj ŝovinismoj kaj defendon de la homaj rajtoj. Apogas la kampanion por enkonduko de Esperanto en aertrafikon. Gratulas la mondcivitanojn, kiuj akceptis esperanton kiel mondlingvon. Reasertas la kontaktojn kun la sindikatoj partioj, aŭ asocioj progresemaj kaj la propagando de Esperanto. Alvokas la subtenon de la aktiveco de la Juna Fako.

En la kunsido de la Junul-Fako de SAT, post la jaraporto, ne sufiĉe klara oni konstatis ke nur 5% el la membraro de SAT, estas malpli ol 35-jara. Pri traktis modifitan gotemburgan agadplanon: serĉadon de perantoj, la Juna Penso, rilatojn kun aliaj junulaj asocioj (esperantistaj kaj ne esperantistaj), solidarecdeklaraciojn kaj laborgrupojn.

Ankaŭ estis aliaj kunsidoj, de TANEF (Turista Asocio Naturamika-Esperanto-Fako), de LEA komitato, de la Liberecana Frakcio.

Estis 5 prelegoj. Lunde, prelegis Prof. Paul Meergad, el Kopenhago. En "Malevoluo evolulando," li pritaktis, kun helpo de diapozitivoj, la kontraŭ hommedion biologian kaj geografian kaj la teknikajn solvojn.

"50 Kongresoj de SAT" estis la prelego de Norbert Bartelmes. Estis tre interesaj la politikaj luktoj en la unuaj kongresoj, speciale de la komunista Frakcio, por preni la SAT aparaton, dum la stalina regado. Ankaŭ la persekuto de -sat-anoj dum la nacia-sociisma epoko, pro siaj ideoj. Estis multaj anekdotoj kiujn revivigis - la preleganto".



"Esperanto el vidpunkto de franca komunisto" (P.Levy) estis diskutata do iuj opiniis pri la teorieco de la asertoj de la preleganto.

Gravan debaton alportis la prelego de Josef. M. Ipfelkofer "Berufsverbote kaj iliaj politikaj sekvoj" Li pritaktis malpermeson praktiki sian profesion pro politikaj kaŭzoj, (ideoj, manifestacio, ktp.) La kerno de la debato estis la neŭtraleco aŭ ne neŭtraleco de la ŝtatoficisto, kaj finfine la ŝtataparato. Ekzemple: la instruistoj kaj la kulturo, ĉu povas esti neŭtralaj?

Ankaŭ en la kongreso estis la arto, reprezentita de la pariza teatrogrupo TESPA, kiu ludis la duhoran teatran verkon "La Justuloj" de A. Camus, kiu pripensigis la rigardantojn pri la perfortaj medioj por atingi la politikan povon.

Marde estis duontaga ekskurso al bavara lupolregiono per autoĉaro. La grupo dividiĝis en du partoj: unu vizitis bierfabrikon kaj la alia lakto-produktejon, kaj kune farmon. Vespermangiĝis en Pfaffenhofen, en la Festsalono de la Hotelo Bortenschlager, kie la loka Esperanto grupo aranĝis festvesperon kun folkloraj dancoj ĉefe de infanoj.

Dum la tuttaga ekskurso ni iris tra la Bavara Alpoj. La tagmanĝo estis sur la "krentalm" super la "kochel"-lago, eksterordinare bela naturpejzaĝo. Ni daurigis ĝis Mittewald, apud Aŭstrio, kie restadis du horojn.

En la sekvonta tago, vendrede, matene, revenis Barcelonon. Ni neniam forgesos la solidarecon de ĉiuj la homoj de tiu kongreso, speciale tiuj kiujn ni traktis pli persone. De la unua tago ni ne estis izolitaj. Ĉiuj, interesiĝis pri ni pri nia lando, pri politika situacio. Nia problemo ne estas nur nia estas de ĉiuj kaj ĉiuj intencas solvi. Pro tio ni dankas al ĉiuj, sed speciale al kamarado kiu solvis al ni la vendredan tranoktadon kiun nomon bedaŭrinde ni ne havas, al la kasisto, al S-ro. Vicente Bayo, kaj ankaŭ al la familio Levy, kiu bone atendis nin.

Francesc Soley.

korespondopetoj

- Multaj Sovet-Uniaj gejunuloj deziras korespondi pri diversaj temoj. Interŝanĝoj laŭ interkonsento.
Boris Kolker, abonkesto 162, SU-450025 UFA, USSR.
- Jerzi Micholski, ul. Pocztowa 2, 26-660 JEDLIŃSK,
POLSKA (POLLANDO).
- Bulgara studentino pri germana filologio deziras korespondi.
Valentina Ljubomirova Joŝeva, Str. Patriarh Eftimi
nº 85, 5250-SVIŜTOR, BULGARIO.
- Pietro Micanti, Lupi di Toscana 8, 20010 BAREGGIO,
ITALIO. Li deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn de la tuta mondo. Aparte li kolektas poŝtmarkojn de la malnovaj Eŭropaj kolonioj kaj de Okcidenta Eŭropo.
- Dudek tri jara fraŭlino volas interkorespondi kun hispanaj gejunuloj.
Jbolya Felúr, 2330 Duncharasztá., Petöfi Str. 92.
HUNGARIO.
- Alia dudek tri jara fraŭlino, sed itala, kiu parolas anglan, francan kaj germanan lingvojn, deziras korespondi pri arto, pentrarto, poŝtmarkoj, ktp.
Ivana Mora, Via Amadeo D'Aosta 3, 20129 MILANO, ITALIO.



ni kreu per esperanto kulturalan alternativon



LITERATURA FOIRO

enhave interesa – grafike moderna
dumonata organo de "La Patrolo"

tutjara abono ĉe UEA: 12 gld (por Nederlando 12,48)

aŭ rekte al la redaktejoj en

Italujo (Milano, pĉk 3/53777) kaj Finnlando (Kuopio, pĉk KU 110928-5)

hejs majo-oktobro 1977 -44-